

Esperanto en Svislando, 10-a parto
La unuaj provoj starigi esperanto-feriejojn
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 447 1972.05.03 & 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum prelegaro ni prezentas al vi historion de la esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpas el la revuo *Svisa Espero*.

A.- En marto 1905 *Svisa Espero* aperigis alvokon de sinjoro Henri Stroele, astronomo en Neuchâtel. Ni citas eron el tiu alvoko :

Cl.- « *Lastan jaron, kiam mia mallonga libertempo alvenis, mi estis iom embarasata : mi ne sciis, kie pasigi ĝin! Kaj tiam mi pensas, ke kelkaj esperantistoj, eĉ eble multaj, estas aŭ estos en sama situacio. Se tiuj esperantistoj povus interkonsenti pri ĉiujara elekto de Alpa centro, ili tie povus kune promenadi kaj Esperante paroladi ; la afero fariĝus eĉ tute interesa, se ĉeestus diverslingvaj esperantistoj.* »

A.- Sinjoro Theophile Hopf, apotekisto en Adelboden, eble sub la influo de tiu alvoko, invitis la esperantistojn feriadu en sia vilaĝo. Ĝus antaŭ la dua Universala Kongreso, kiu okazis en Ĝenevo komence de septembro 1906, li eldonis gvidlibron titolita *Tra Oberlando Berna*. Recenzo, kiu aperis en novembro 1906, parolas pri gvidlibro lukse presita. Tiu broŝuro havis 30 tre belajn ilustraĵojn. En januaro 1909 *Svisa Espero* informas, ke de nun ekzistas en Adelboden Esperantujo sub la nomo « Eldorado ».

Cl.- Pri tiu Adelbodena Esperantujo « Eldorado » mankas informado. Ĉu ĝi restis bela revo ? Ĉu multaj esperantistoj uzis tiun eblecon por kune libertempoj ? Pri tio ne raportas *Svisa Espero*. Sed ĝi raportas sufiĉe detale pri la klopodado starigi alian libertempejon en Meggen, vilaĝo situanta borde de la Kvarkantona Lago. Jen eroj el artikolo, kiu aperis en aprilo 1908.

A.- « *Dank'al la klopodoj de sinjoro Schmid, nun en nia lando ekzistas Esperantujeto en Meggen, apud la Lucerna Lago. Ni ricevis la prospekton de l' hotelo, kaj ni plezure donos kelkajn informojn pri la « Internacia Esperanta Paradizo » ; la vilaĝo estas inter la belega, mond fama Rigi kaj la malhela Pilatus, en ĉarma situacio, kun dolĉa klimato.* »

Cl.- Dum du jaroj *Svisa Espero* plurfoje informis pri tiu Esperantujeto, kiu estis bone vizitata de la svisaj esperantistoj. En novembro 1908 la fondo de Esperanto-Grupo en Meggen estis anoncita. En majo 1909 oni sciigis, ke tiu grupo de Meggen havas 12 membrojn, ke propagandilo pri la Internacia Esperanta Paradizo estas en preparo. Pluraj esperantorenkontiĝoj okazis en tiu por Svislando sufiĉe centra loko.

A.- Sed la plej vigla Esperantujo funkciis dum kelkaj jaroj en la sport- kaj kurac-loko Davos, tio dank'al la klopodoj kaj personeco de fraŭlino E. Herzog. La ekzisto de Esperantista Grupo en tiu alpa sportejo estas anoncita en *Svisa Espero* en februaro 1909 per tripaĝa artikolo ilustrita de kvar fotoj. Unu el tiuj fotoj montras bobistojn starantajn apud bobveturilo nomata Esperanto. Tiu bob-veturilo, kiel rakontas la artikolo, estis luebla. En la librovendejo de sinjoro J. Merz estis aĉeteblaj ĉiuj esperantaj libroj tiam aĉeteblaj, kaj la fremduloj estis invitataj viziti la kunvenojn de la Esperanto-Grupo.

Cl.- En la informo pri tiu montara grupo ni trovas la nomojn de la gastoj. Jen ekzemplo :

A.- « *Aprilo 1910 : La klubo estis feliĉa havi en la kunvenoj tiun ĉi vintron kiel gaston nian ŝatindan armenan samideanon S-ro Georg Davidov, el Saratov (Rusujo). Per sia afableco kaj interesplenaj komunikaĵoj pri la tutmonda Esperantista movado li multe vigligis la klubon, kiu bedaŭras lian forveturon.* »

Cl.- Ankaŭ ekzistis eblecoj renkonti esperantistojn en Château-d'Oex, tio dank'al la klopodoj de sinjoro René de Saussure, kiu regule feriiis en tiu bela alpa vilaĝo. Jen ni legas al vi erojn el artikolo, kiu aperis en *Svisa Espero* en marto 1913. Ĝi donas ideon pri la propagandaj metodoj tiam uzataj en tiuj feri-lokoj :

A.- « *En januaro okazis en hotelo de Château d'Oex bela kostumita balo.*

Cl.- *Sinjinorino el Neuchâtel-a Esperantista Grupo, kiu pasigas tie la vintron kun sia filineto, havis la ideon ŝajnestiĝi kiel « Esperanto ».*

A.- *Ŝi havis blank-atlasan robon, artiste ornamitan per silkverdaj steloj kaj flagetoj ; verdan stelon kiel kapornamon, kaj en la mano esperantan ventumilon, portantan afiŝon : « Apprenez l'Espéranto » - ktp. [...]*

Cl.- *Tiu Sinjinorino Esperanto kondukis ravan veturileton, tute ornamitan per gazo, rubando, kaj serio el diverkoloraj rozoj, meze de kiuj gracie sidis ŝia filineto, figuranta « Amoron ».*

A.- *Ambaŭ eniris tiel en la salonon : la lumoj estingiĝis, la orkestro ludis, kaj brilanta rozfajro iluminis la ĉarman aperon de Amoro kondukita de Esperanto.*

Cl.- *Estis vere triumfa eniro !*

A.- *Meze de la salono, kiam ĉio eksilentis, Sinjinorino Esperanto faris paroladeton por prezenti sin. – Kaj poste, ŝi petis de la rigardantoj ke ili ankoraŭ bonvolu aŭskulti Amoron.*

Cl.- *Amoro, kvankam tre juna, diris ke la vera Amo celas unuigi per Esperanto ĉiujn diverspopolojn ; kaj ĝi tre bone deklamis strofojn el la Espero de nia Majstro D-ro Zamenhof. [...] Fine, ĝi disĵetis tra la salonoj multnombrajn stelojn.*

A.- *Tondraj aplaŭdoj sekvis. La favoro al Esperanto estis akirita ! Fremduloj, kiuj la antaŭtagon ne konis Esperanton, petis detalajn informojn pri la bela internacia lingvo. Tuj ŝlosiloj, poŝtkartoj, libretoj estis disdonataj kaj tiel amuzante aliajn personojn, oni faris grandan utilan propagandon.* »

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!